

Kreadfenestro de Sieger Köder [ziger keder] en Hohenberg, DE
Kun afabla permeso por Dia Regno. © Kopirajto ĉe Schwabenverlag AG

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (895) • 2012 •



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 325 615 651; ✉ polnicky@quick.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Kreadfenestro en Hohenberg	75
Personaj impresoj somere	76
Matenpreĝo laŭteme "kaŝitaj trezoroj"	77
Jesuo descendis en Inferon	79
Ekumena diservo ene de IEK en Svitavy	87
Skizo de la ekumena diservo	88
Preĝo por ĉiu tago	90
Henk de Hoog - Andreo Cseh 6	91
Evidente plu aktivas	94
Informetoj	95
Venu ĉiuj	96

REDAKTORAJ VORTOJ

Mi kaj mia familio denove havis Meblecon partopreni en KELI-kongreso somere. Ĉiam estas agrabla travivaĝo. Sekvontnumere vi povos legi pli pri la kongreso. Ĉi-linie mi volas menci, ke mi kaptis la okazon starigi kelkajn demandojn al la plej multaj kongresanoj pri Dia Regno. Ne tute surprizige la respondoj estis ege diversaj. Ekzemple kelkaj opiniis ke la enhavo estas iom peza kaj volas malpli da teologiajn artikolojn, aliaj kontraŭe. Nur malmultaj legas ĉion, sed la plej multaj trafoliumas kaj legas selektitajn partojn. La plej multaj respondintoj samopiniis, ke fotoj kaj artikoloj de konatuloj tiras ilian intereson. Mia konkludo do estas, ke mi daŭre provu miksi diversajn temojn kaj artikolojn por ke ĉiu leganto tiel trovu iun interesan temon. Do mi dankas ĉiun kontribuanton kaj esperas ke vi daŭre sendos al mi eblajn artikolojn por ke la enhavo estonte estu same bona miksaĵo.

Kreadfenestro en Hohenberg

Hermann SORG, instruisto en Hohenberg

Tradukis Siegfried KRÜGER, DE

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo. Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo. Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona; kaj Dio apartigis la lumon de la mallumo. Kaj Dio nomis la lumon Tago, kaj la mallumon Li nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, unu tago. Genezo 1, 1-5

Forta mano videbliĝas, la manplato sin montras al ni kaj sen klarigo ni ne tuj kaptas la sencon. Sed tiam la rigardo al la manlinioj montras al ni iometan diferencon al la niaj. Tie, kie ĉe ni estas la vivlinio, oni vidas malgrandan grekan literon, la Alfo. Alfo kaj Omego, komenco kaj fino. *"En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron....."*

El kio konsistas nia ĉielo kaj nia tero? Oni vidas ĝin elgluti la fingrojn: Atomon, baza konstruero de la materio. La tuta materio konsistas el tiaj "atomoj, maldivideblaj partetoj", kiuj



La artisto kaj pastro Sieger Köder

ekde la kvardekaj jaroj tamen estas divideblaj. La elektronoj ĉirkaŭas sur siaj vojoj la atomkernon, kiel la planedoj la sunon. Malgrandeta sunsistemo, sennombraj fojoj ekzistanta en polvo.

Kaj ĉio ekzistas el tiuj malgrandetaj sunsistemoj: La sen viva naturo, la plantoj kaj bestoj kaj fine ankaŭ ni, la homoj, la krono de kreitaĵo – espereble!

Nun ankaŭ estas klare, al kiu apartenas la mano. Ĝi estas la mano de Dio, kun tiu kaj el tiu ĉio estas kreita: La mano kiel simbolo de la laboro kaj kiel bildo de la gardado. En tian malferman manplaton oni povas ion enmeti, gardi aŭ kaŝi en ĝi.

La bildo estas komenco de pliaj kreadfenestroj en Hohenberg. Per ĝi Sieger Köder prezentas la kreadon tiel, kiel vidas ĝin la hodiaŭa teologio kiel evolucion, kiel klarigas ĝin Teilhard de Chardin al ni. La fenestro ankaŭ finas per manplato, tiam kun Omego. Dio estas la komenco kaj la fino, ĉio okazas en la manoj de Dio – do reale bela bildo pri la gardado de la kreitaĵo en Dio.

☪

Personaj impresoj somere

Teksto kaj fotoj de Wil van GANSWIJK-VLASBLOM, NL

Kara redaktoro, sur mia korespondlisto por la (eks)kursanoj de la Esperanto-kurso por nederlandanoj mi metis malgrandan raporton pri mia feriado ĉi-jare.

Reveninte el Zoblitz, kie mi partoprenis KELI-kongreson, mi volonte rakontos ion pri miaj travivaĵoj. Du tagojn antaŭ la komenco de la kongreso mi trajne vojaĝis al Chemnitz por gastloĝi tie du noktojn ĉe partoprenanto de Pasporta Servo.

Dumvoje mi ricevis en Oldenburgo neatendite helpon de juna sinjoro, kiu proponis al mi porti mian kofron. Montriĝis ke li apartenas al Kristana helporganizo. Kiam mi demandis al li kie troviĝas ebleco trinki kafon, li kondukis min al iu ejo, kie estis pli da homoj kaj li regalis min je senpaga kafo kun regalo. Mi estis agrable surprizita pri tiu helpo.

En Leipzig mi havis denove bonŝancon, ĉar la sekva trajno kiun mi

bezonis, atendis ĝis ĉiuj el la malfruiĝinta trajno estis alvenintaj. Mia gastigantino bovenigis min en Chemnitz sur la kajo. Ŝi antaŭe avertis min, ke ŝi loĝas alte, 80 ŝtupojn oni devas surgrimpi! Malgraŭ tio mi havis agrablajn tagojn ĉe ŝi. Ni multe babilis kaj ŝi montris al mi interesajn lokojn en la urbo. Per aŭtobuso mi daŭrigis mian vojaĝon al Zöblitz, kie mi kaj tri rumanoj ekde iu bushaltejo estis transportitaj al la kongresejo.

Ĝi troviĝis meze en la Ercmontaro. Tio signifis ke ĉiuj vojoj estis oblikvaj. Krome la kongresejo situis en malgranda valo, do grimpi estis ĉiam bezonate. Ĉeestis 54 partoprenantoj el kiuj mi konis la plej multajn. Ili venis el 11 landoj. La etoso estis amika, la pro-

Hedwig kaj Rudolf Fischer kaj Ernst Leuze



Pastora familio Rohloff



gramo interesa, la manĝoj bongustaj, la vetero suna, kvankam kelkfoje subite fulmotondris kaj pluvegis, sed ne longdaŭre. Ni ekskursis al subĉiela muzeo kaj al nuksrompilmuzeo, la nura en Eŭropo.

Estis orgenkoncerto en vilaĝa preĝejo kaj koncertis por ni montara kantgrupo. Ĉiun tagon la kantemuloj povis partopreni kunkantadon dum unu horo. Estis mallongaj maten- kaj vesperpreĝoj kaj mezsemajne diservo.

La duontagan promenekskurson mi neniam forgesos. Ni iris al tre ĉarma rivereto. Sed por atingi ĝin ni devis malsupren grimpi laŭ tre oblikva arbarvojeteto kun multe da ŝtonoj. Sen helpo de granda ombrelo, kiun la edzino de la

juna luterana pastoro pruntedonis al mi kaj kiu tre taŭgis kiel bastono, mi ne estus sukcesinta sekvi la aliajn. Nekredeble ke iliaj du filinetoj du- kaj kvarjaraj senprobleme kunmarŝis!

La prelegoj estis prezentitaj de la kongresanoj mem kaj diverstemaj, interalie pri la ĉeĥaj fratoj Karlo kaj Josefo Ĉapek, verkistoj kaj pentristoj, pri 'Dia Regno', la revuo de KELI nun sur interreto, la Esperanto-Biblio jam parte voĉlegata je interreto. Cetere pri gramatiko kaj tradukado, la kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto Federacio) en Herzberg kaj pri diversaj aliaj temoj. La adiaŭa vespero estis kiel ĉiam tre sprita kaj agrabla.

☪



Matenpreĝo okazinta dum la KELI-kongreso en Zöblitz, rilate al la kongresa temo "Kaŝitaj trezoroj"

Anna & Mats LANDFORS, SE

Vi ĉiuj certe dum la vivo iufoje malkovris ion, kion vi rigardis kiel (kaŝitan) trezoron. Dum tiu ĉi matenpreĝo ni montros al vi kelkajn Bibliajn trezorojn spiritajn. Sed enkonduke jen preĝo el la himnaro de la Sveda Luterana Eklezio:

Vi kiu volis mian vivon kaj kreis min laŭ Via volo; ĉion en mi Vi konas kaj ĉirkaŭigas kun amemo, la malforton same kiel la forton, la malsanon same kiel la sanon. Tial mi transdonas min al Vi sen timo kaj

rezervo. Plenigu min kun Via boneco, tiel ke mi fariĝas beno. Mi laŭdas Vian saĝecon, Vi kiu prenas al vi la malforton kaj tion kio estas domaĝita kaj metas Vian trezoron en rompiĝemajn argilajn vazojn. Amen.

Psalmaro 90,1-2

Mia Sinjoro, Vi estis por mi loĝejo de generacio al generacio. Antaŭ ol la montoj naskiĝis kaj Vi kreis la teron kaj la mondon, kaj de eterne ĝis eterne, Vi estas Dio.

Kion ni havas en Dio?

Psalmaro 91,1-2

Kiu loĝas sub la ŝirmo de la Plejaltulo, tiu ripozas en la ombro de la Plejpotenculo. Mi diras al la Eternulo: Nia rifuĝejo kaj nia fortikaĵo estas Dio, kiun mi fidas.

Psalmaro 23,1

La Eternulo estas nia paŝtisto; mi mankon ne havos.

Psalmaro 103,11

Ĉar kiel alte estas la ĉielo super la tero, tiel granda estas Lia boneco por tiuj, kiuj Lin timas.

Dia plej granda donaco al ni estas Jesuo

Luko 19,10

La Filo de homo venis por serĉi kaj savi la perditajon.

Rom. 6,23

Ĉar la salajro de peko estas morto; sed la donaco de Dio estas eterna vivo en Kristo Jesuo, nia Sinjoro.

Jesuo diris

Mateo 7:7

Petu, kaj estos donite al vi; serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermite al vi.

Johano 14,26

La Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi. Pacon mi lasas al vi.



Kiu estas Jesuo?

*Jesuo, Vi estas la vojo,
Al ni Vi la ĝuston eldiras.
Vin sekvas ni nun en ĝojo
Kun multaj, kiuj samvoje iras.*

*Jesuo, Vi estas la vero,
Ni bezonas ĝin pli kaj pli.
Kaj dum nia vivo sur tero,
Ni serĉas la veron de Vi.*

*Jesuo, Vi estas la vivo,
La vivo por ĉiuj ni.
Ĝi estas la granda motivo;
eterne vivi kun Vi.*

Verkis Anna Landfors

Jesuo descendis en Inferon?

APOKRIFAJ EVANGELIOJ kaj simile
[parto el verkata *Antologio Latina* volumo 5.]

Gerrit BERVELING, NL

Multaj homoj, ankaŭ pro libroj kiel *The Da Vinci Code* de Dan Brown el 2003, havas la impreson, ke ekzistas amaso da pli-malpli sekretaj praaj dokumentoj, kiuj – se malkaŝitaj – signifus kvazaŭ dinamito sub la pluekzistado de la kristana eklezio. Prefere tiaj tekstoj estu tenataj kaŝitaj en la biblioteko de Vatikano: tiaj komplot-teorioj estas kun plezuro legataj.

Kio en ĝi estas vero, estas ke la biblioteko de Vatikano nepre enhavas en si vere trezorajn verkaĵojn, grandparte konatajn de fakuloj, sed ja siaspece unikajn. Ankaŭ pluraj aliaj malnovaj universitataj bibliotekoj enhavas kompareblajn trezorojn: manuskriptojn, inkunablojn, raraĵojn ... Sed ĉar Vatikano havas pli grandan bibliotekon ol la mezumaj, ĝi havas pli da trezoroj. Kio ankaŭ estas vero en la rakonto de Dan Brown, estas ke ekzistas malnovaj tekstoj, kiuj por simpluloj, kies religia fido dependas de tio, kion li/ŝi komprenis de simpla vilaĝa predikisto, povas efiki kiel vere skua: multajn aferojn tra la jarcentoj la homoj plu rakontadis, eĉ kredis, kaj prenis por veraĵo – dum apenaŭ ekzistas fidinda kialo.

Ankaŭ ekzistas tuta fasko da tekstoj, kiuj nomiĝas la apokrifoj.

Apokrifaj kaj duakanonaj tekstoj

Ne estas eleganta termino, sed intertempe jam iom diskoniĝis la termino en la titolo de miaj tri volumoj da *Duakanonaj Libroj*. Per tio oni indikas tiajn verkojn, kiuj en pluraj eklezioj apartenas al la Biblio, dum en aliaj eklezioj ilin oni ne agnoskas. Per *Apokrifaj Libroj* oni indikas tiajn tekstojn, kiuj laŭ la enhavo eble povus esti konsiderataj kiel apartenantaj al la Biblio, sed kiuj en *neniu* eklezio estas oficiale rekonataj. Da tiaj ekzistas tuta fasko – unuflanke apokrifoj, kiujn oni daŭre konis tra la jarcentoj – ĉu kontraŭbatalis fanatike pro ĝia danĝereco; ĉu ignoris; ĉu eble eĉ legadis kvazaŭ popularan negravan, iom naivan legaĵon. Aliflanke ekde la jarfina ŝanĝiĝo ĉirkaŭ 1900 oni ĉiam pli malkovris manuskriptojn en la sablaro de Egiptujo: kaj tie oni retrovis plurajn tekstojn, inter kiuj kelkaj fariĝis vere influaj en teologiaj debatoj: ni menciu pri ekzemple *Evangelio kopta laŭ Tomaso*, *Evangelio de Maria Magdalena*, *Evangelio de la Vero* – multaj tekstoj en Kopta traduko, sed ankaŭ foje papirusaj fragmentoj en la Greka ¹

Ĉi tie oni renkontos, ekzemplodone por ĉi tuta ĝenro de apokrifaj tekstoj, rakonton pri Jesuo, kiu ne renkontiĝas en iu ajn Biblia eldono: temas pri detalo el la estiĝinta

¹ Vidu *The Nag Hammadi Library* k.a.

Kristana “mitologio”, pie kredata de multaj: la Germana teologo Lobegott Friedrich Konstantin von Tischendorf (1815-1874), kiu fariĝis mondfama pro la malkovro kaj eldono de la *Codex Sinaiticus* (Kodekso de l’ monaĥejo ĉe Sinaj) – unu el la plej praaj kodeksoj pri la biblia teksto, kredis, ke la sekva rakonto pri Jesuo origine devenas el la fino de l’ unua jc p.Kr., sed ĝia Latina formo datiĝas probable el la mezo de la 2-a jc. Por multaj nunuloj, eĉ por multaj kristanoj, temas pri kvazaŭ sensignifa detalo en tradicia kredkonfeso, ke postmorte “*Jesuo descendis al Infero*”, sed ĉi tie vi legas la rakonton. Temas pri Jesuo, kiu postmorte en Infero venas liberigi ĉiujn justulojn, kiuj mortis antaŭ lia veno.


Kiel ajn oni juĝu enhave pri tiaj rakontoj, ili almenaŭ atestas pri forta flanko de la populara religio.

Jen traduko el la latina:

Descendo de Jesuo al la Infero

1:1 Rabi¹ Adas, rabi Fines kaj rabi Egias, tri viroj venintaj el Galileo por atesti, ke ili vidis Jesuon forprenita al la ĉielo, leviĝis meze de la Judaj gvidantoj kaj diris malkaŝe al Pastroj kaj Levitoj, kiuj kunvenis por konsiliĝi: Sinjoroj, kiam de Galileo ni iris al Jordan, al ni renkonte venis granda amaso da homoj en blankaj vestaĵoj, kiuj estis antaŭ ne longe mortintaj. Interalie ni vidis tie Karinon kaj Leŭcion: ili venis al ni, kaj reciproke ni nin kisadis, ĉar estis karaj amikoj. Ni demandis: Diru do, amikoj kaj fratoj, kio estas ĉi animo kaj ĉi karno? kaj kiuj estas viaj akompanantoj? kaj kiel vi havas korpon, ĉar antaŭ ne longe vi ja mortis!

¹ = rabeno.



La Kodeksoj de Nag Hammadi estas amplekso de gnostikaj kristanaj kaj paganaj tekstoj, malkovritaj najbare de Nag Hammadi norde de Luksoro (Egiptio), en decembro 1945.

[El Vikipedio]

2 Ili diris responde: Ni resurektis kun Kristo el la Infero; li mem vekis nin el la morto. El tio vi sciu, ke la pordoj de morto kaj obskuro estas neniigitaj, kaj animoj de sanktuloj eliris kaj ascendis ĉielen kun Kristo la Sinjoro. Ĉar al ni ordonis la Sinjoro mem, ke ni en difinita tempo ekpromenu laŭ la bordoj de Jordan kaj la montoj; tamen ne aperante al ĉiuj, nek parolante kun ĉiuj – sed nur kun kiuj plaĉas al li. Ni ankaŭ ne povis aperi aŭ paroli al vi, krom kun permeso de la sankta Spirito.

3 La tuta amaso, kiu ĉeestis, ektimis, tion aŭdante, kaj mirplenaj ili sin demandis, ĉu vere okazis, kion atestis ĉi Galileanoj. Tiam Kajafas kaj Annas diris


al la kunveno: Poste malkovriĝos ĉio, kion ili atestis, antaŭe kaj poste. Se montriĝos ke estas vere, ke Karino kaj Leŭcio restas vivaj en sia korpo, kaj se ni ilin per ĉi okuloj povos percepti, tiam komplete vere estos, kion ili atestas; sed tiam ili rakontos al ni ĉion detale. Sed se <statas> male, vi sciu, ke ili mensogis ĉion.

4 Tiam ili rapide interkonsiliĝis, kaj decidis elekti taŭgajn virojn, kiuj timas antaŭ Dio, kaj kiuj scias, kiam ili estis mortintaj kaj entombigitaj: ili detale esploru kaj eltrovu, ĉu statas kiel ili aŭdis. Iris do dek kvin viroj, kiuj ĉeestis ĉe ilia endormiĝo¹ kaj kiuj ĉeestis, kiam oni sepultis ilin kaj vidis la tombo-monumentojn. Ili trovis iliajn tombojn malfermaj, kaj multege da aliaj same, kaj ili trovis neniujn spurojn el ostoj aŭ polvo. Kaj ege rapide ili reiris raporti kion ili vidis.

5 Ilia tuta sinagogo estis perturbita en tristo, kaj reciproke ili diris: Kion ni faru? Annas kaj Kajafas diris: Ni sendu al la loko, kie ili estas, reprezentantojn el inter la plej gravaj de la urbo, kaj ni petegu ilin: eble ili bonvolos veni al ni. Tiam ili sendis al ili Nikodemon kaj Jozefon kaj tri Galileajn rabenojn, kiuj konis ilin laŭvide, por peti ĉu ili bonvolas veni. Ili vojaĝis piede tra preskaŭ la tuta regiono de Jordan kaj de l' montaro, kaj revenis, sen trovi ilin.

6 Jen subite el la monto Amaleĥ aperis grandnombra amaso: ili descendis, ĉirkaŭ dek du mil viroj, kiuj resurektis kune kun la Sinjoro. Kiam oni rekonis tie plurajn, oni ne povis ion diri pro timo, kaj pro la vizio de anĝeloj, kaj oni staris

¹ Eŭfemismo por morto



Kodekso de l' monaĥejo ĉe Sinaj

defore rigardante kaj aŭskultante al ili, kiel ili alpaŝas kantante psalmojn kaj dirante: Resurektis la Sinjoro de la morto kiel li diris, ni jubilu kaj ĝoju ĉar li regadas poreterne. Mirplene la senditoj falis pro timo vizaĝalteren, kaj ili ricevis la konsilon ekserĉi Karinon kaj Leŭcion en ilia propra domo.

7 Ili stariĝis, kaj iris al iliaj domoj kaj trovis ilin kviete ĉe la preĝado. Enirante ili falis antaŭ ili teren, salutis kaj diris: Amikoj de Dio, la tuta amaso de la Judoj sendis nin al vi, ĉar ili aŭdis ke vi resurektis de la morto, kaj ili petas kaj petegas vin veni al ili, por ke ni ĉiuj sciu la grandajn farojn de Dio, kiuj okazis en nia epoko. Laŭ Dia ordono ili stariĝis kaj iris kun ili, kaj ili eniris la sinagogon. La tuta amaso de la Judoj kune kun la Patroj tiam metis en iliajn manojn librojn de la Leĝo, kaj ili priĵuris ilin je Dio Heloi kaj Dio Adonai², je la Leĝo kaj la Profetoj: Diru al ni kiel vi resurektis el

² Supozeble tio devas indiki kiel la Judoj nomas Dion JHVH.

la morto, kaj kiaj mirakloj okazis en nia tempo, pri kiuj ni neniam antaŭe aŭdis: ĉar pro timo ĉiuj niaj ostoj rigidigis kaj elsekiĝis, kaj la tero skuiĝas sub niaj piedoj; ĉar ni akordiĝis elverŝi justan kaj sanktan sangon.

8 Karino kaj Leŭcio tiam signis permane, ke oni donu al ili rulaĵon da papiruso kaj inkon. Tion ili faris, ĉar la sankta Spirito ne permesis al ili paroli kun ili. Ili donis al ili plurajn foliojn kaj tenis ilin dise en apartaj kameroj. Sed perfingre farante la signon de la kruco de Kristo, ili ekskribis sur la unuopaj rulaĵoj: kaj kiam ili estis pretaj, kvazaŭ unuvocĉe ili kriis el siaj apartaj kameroj: Amen. Ambaŭ leviĝis kaj Karino donis sian tekston al Annas, Leŭcio la sian al Kajafas, ili foradiaŭis kaj reiris al siaj tomboj.

9 Annas kaj Kajafas malfermis la rulaĵon kaj eklegis unuope en silento. Sed la tuta popolo tion ne aprobis, kaj ili diris: Malkaŝe legu al ni, kio estas skribita; kaj postlegade ni konservos tion, por ke la vero de Dio de ĉi malpuruloj kaj trompantoj ne estu distordita per ilia blindeco en falsigon. Annas kaj Kajafas timplene transdonis la foliojn al rabi Adas, rabi Fines kaj rabi Egias, kiuj venis el Galileo kaj sciigis la forpreniĝon de Jesuo en la ĉielon: al ili la tuta amaso de la Judoj kredis, ke ili legu ĉi skribaĵon. Kaj ili legis la paperon kun jena teksto:

2:1 Sinjoro Jesuo Kristo, filo de la Vivanta Dio! Permesu al mi, Karino, ke mi rakontu la miraklojn, kiujn vi plenumis en Infero. Ni estis katenitaj en obskuro kaj tenebro de l' morto en Infero, sed subite granda lumo ĉirkaŭis nin, kaj Infero kaj la pordoj de la morto tremis. Aŭdiĝis la voĉo de la Filo de la

Plejalta Patro, kvazaŭ sono de granda tondrado; fortege ordonante li jene diris: Viajn pordojn, ho princoj, vi forigu; la eternajn pordojn neniigu; la reĝo de l' gloro, Kristo la Sinjoro, estas preta por eniri.

2 Tiam Satano, estro de la morto, alvenis, timplene fuĝante, kaj li diris al siaj servistoj kaj al Infero: Venu kunel! Fermu viajn pordojn, ferajn barilojn submetu, kuraĝe batalu kaj rezistu, ke ni ne kaptiĝu por enfermiĝi en katenoj. Ĉiuj liaj malpiaj servistoj timplene ekfermis la pordojn de la morto kun plena zorgemo, ferajn riglilojn kaj barilojn malrapide ili enŝovis, ĉiujn siajn insignojn fortamane ili tenis, kaj ili ululis per plej hida kaj fia voĉo.

3:1 Tiam Satano diris al Infero: Preparu vin por akcepti, kiun mi transdonos al vi. Sed Infero reagis al Satano: Tio ne estis alia voĉo ol la voĉo de la Filo de la Plejalta Patro, ĉar la tero kaj ĉiuj lokoj de Infero tiel tremis pro ĝi: tial mi kredas, ke ĉiuj miaj katenoj jam kuŝas malfermaj. Sed mi priĵuras vin, Satano, kapo de ĉiuj fiuloj, je viaj kaj miaj fortoj: ne konduku lin al mi, por ke dum ni volas kapti lin, ni ne estu kaptitaj de li. Ĉar se tuta mia forto – ĉe la nura sono de lia voĉo – jam disfalis, kion vi kredas ke okazos se alvenos lia ĉeesto?

2 Satano, estro de la morto, jene respondis al li: Kion vi krias? Ne timu, plej malnova fia amiko mia, ĉar mi incitis kontraŭ li la tutan popolon de la Judoj, kaj mi lasis lin frapi survange, kaj pere de unu el liaj disĉiploj mi igis lin perfidi; li mem estas homo, kiu tre timas antaŭ la morto: pro timo li diris: Trista estas mia animo ĝismorte; kaj al ĝi mi kondukis lin, ĉar nur ĵus levita surkruce

li ekpendis.

3 Tiam diris al li Infero: Se li estas la sama, kiu per la nura ordono de sia parolo igis kvazaŭ aĝle forflugi el mia sino Lazaron, jam kvaratagan, tiam li ne estas homo en sia domo, sed Dio mem en majesto. Mi petas, ke vi ne venigu lin al mi. Satano diris al li: Tamen preparu vin, ke vi ne ektimu. Li jam pendas surkruce, mi ne plu povas ŝanĝi tion. Tiam respondis Infero jene al Satano: Se vi ne plu povos ŝanĝi ion, jen alvenas via perejo. Mi estos forĵetita kaj restos sen honoro: sed vi estos inter la turmentoj en mia regno.

“Tiam diris al li Infero: ... Mi petas, ke vi ne venigu lin al mi. Satano diris al li: Tamen preparu vin, ke vi ne ektimu. Li jam pendas surkruce, mi ne plu povas ŝanĝi tion.

4:1 La sanktuloj de Dio aŭdis la debaton inter Satano kaj Infero; ili ankoraŭ tute ne rekonis sin reciproke sed estis tamen rekonantaj sin. Nia sankta patro Adam tiel respondis siaparte al Satano: Estro de la morto, kion vi timas kaj tremas? Jen venas la Sinjoro, kiu nun neniigos ĉiujn viajn farajojn kaj vi estos kaptita kaj ekzilita de li poreterne.

2 Ĉiuj sanktuloj aŭdis la voĉon de nia patro Adam, kiel kuraĝe li respondis al Satano, kaj ĝoje ili sin sentis fortigitaj: kunkurante al patro Adam ili ĉiuj amasiĝis. Tiam rigardis nia patro Adam tutan ĉi amason, kaj amplene miris, ĉu ĉiuj ili estis kreitaj el li. Brakumante ĉiujn, kiuj

staris apude, verŝante plej amarajn larminojn, li turnis sin al sia filo Set kaj diris: Rakontu, filo Set, al patriarĥoj kaj profetoj, kion diris al vi la gardisto de la paradizo, kiam mi petis vin porti al mi el la oleo de kompato, por oleumi mian korpon, kiam mi malsaniĝis.

3 Li respondis: Kiam vi sendis min al la pordo de la paradizo, mi tie petis kaj demandis plorante la Sinjoron, kaj mi vokis la gardiston de la paradizo, ke li donu el ĝi al mi. Tiam venis la ĉefanĝelo Miĥael kaj diris: Set, kial vi ploras? Vi devas ja scii anticipe, ke via patro Adam ricevos de tiu oleo de kompato nur post multe da teraj generacioj. Ĉar la plej amplena filo de Dio de la ĉielo venos al la tero, kaj li estos baptita de Johano en la rivero Jordan; kaj tiam via patro Adam ricevos de tiu oleo de kompato, kaj same ĉiuj kiuj fidos je li. Kaj la homoj, kiuj fidis je li – ties regno daŭros poreterne.

5: 1 Ĉiuj sanktuloj, tion aŭdante, denove ekjubilis kun ĝojo. Unu el la ĉirkaŭaj, Jesaja laŭnome, fortavoĉe substrekis: Patro Adam kaj ĉiuj ĉirkaŭaj, aŭdu miajn dirojn. Kiam mi estis surtere, kaj la sankta Spirito instruis min, en profetaĵo pri tiu ĉi lumo mi kantis: ke nia popolo sidis en mallumo kaj vidis grandan lumon, kaj ke por tiuj en regiono de ombroj de morto leviĝis lumo. Ĉe tiu diro patro Adam kaj ĉiuj aliaj sin turnis kaj demandis: Kiu vi estas? Ĉar vi ja parolas veron. Sed li respondis: Mi nomiĝas Jesaja.

2 Apud li tiam aperis alia, kiu aspektis kiel dezertoloĝanto. Lin ili pridemandis: Vi kiu estas, ke tion vi portas sur via korpo? Li respondis: Mi estas Johano la Baptanto, voĉo kaj profeto de la Plejalta.

Mi iris antaŭ la vizaĝo de la sama Sinjoro, por glatigi antaŭ li la dezerton kaj prepari ĉion kiel ebenajn vojojn. La ŝafidon de l' Sinjoro, la filon de Dio mi montris per fingro al la Jerusalemanoj kaj indikis lin. Mi baptis lin en la rivero Jordan. La voĉon de la Patro kiu de la ĉielo sonis super li mi aŭdis proklami: Jen tiu ĉi estas mia amata filo, kiu plaĉas al mi. De li mi ricevis la promeson, ke mem li descendos al Infero.

Tiam patro Adam, tion aŭdante, laŭtavoĉe ekklamis: Haleluja! Tio estas en traduko: La Sinjoro venis.

6: I Iu alia, kiu ĉeestis tie, rimarkinda pro imperiada signo, David laŭnome, diris proklame: Kiam mi estis surtere, mi malkaŝis pri la mizerikordo de Dio kaj ke li vizitadis sian Popolon, profetante la estontajn ĝojojn, dirante por ĉiame: Liaj mizerikordoj laŭdos la Sinjoron, kaj liaj mirakloj gloros la filojn de la homoj, ĉar bronzajn pordojn li trabreĉis kaj ferajn riglilojn li rompis. La sanktaj patriarĥoj kaj profetoj tiam komencis rekoni sin reciproke, kaj ĉiuj rakontis pri siaj propraj profetaĵoj. Tiam diris Jeremia, ekzamenante siajn profetaĵojn, al patriarĥoj kaj profetoj: Kiam



Infero laŭ Doré, ilustraĵo por La Dia Komedio

mi estis surtere, mi profetadis pri la filo de Dio, ke li estas vidita surtere kaj parolis kun la homoj.

2 Ĉiuj sanktuloj tiam eklaŭdis pri la lumo de Dio, pri la aspekto de patro Adam kaj pri la respondoj de ĉiuj patriarĥoj kaj profetoj, kaj ili proklamis: Haleluja: Benata estas kiu venis nome de la Sinjoro: pro ilia laŭta kriadado ek-timis Satano, kaj li serĉis eliron por fuĝi. Sed tio ne estis, ĉar Infero kaj ties satelitoj tenis lin fermita en Infero, sen eblo eskapi. Ili diris al li: Kial vi tremas? Neniamaniere ni permesos vin eliri el ĉi tie. Sed prenu tion sur vin, kiel decas, de tiu, kiun ĉiutage vi kontraŭbatalis; se ne, sciu, ke ekzillite de li vi restos sub mia gartateco.

7: 1 Denove sonis la voĉo de la filo de l' Plejalta Patro, kvazaŭ sono de granda tondrado: Levu viajn pordojn, princoj, kaj leviĝu la eternaj pordoj, kaj eniros la reĝo de gloro. Tiam ekkriis Satano kaj Infero: Kiu estas tiu reĝo de gloro? Per la voĉo de l' Sinjoro sonis la respondo: La forta kaj potenca Sinjoro: la Sinjoro forta en batalo.

2 Post tiu sono venis homo, kies aspekto estis kvazaŭ rabisto, kun kruco surŝultre, kaj li kriis defore: Malfermu por mi, ke mi eniru. Satano iom malfermis por li, kaj enlasis lin en la loĝejo, kaj denove fermis post li la pordon. Ĉiuj sanktuloj vidis lin tre klare, kaj tuj diris. Via aspekto estas tiu de rabisto. Diru do: kio estas kion vi skuas surdorse? Humile li respondis: Mi estis vera rabisto, kaj la Judoj krucumis min kune kun mia Sinjoro Jesuo Kristo, filo de la Plejalta Patro. Mi nun antaŭiras antaŭ li, li mem sekvos tuj poste.

3 Sankta David tiam kolerege pro-

klamis kontraŭ Satano: Pleja malpurulo, malfermu viajn pordojn, ke la reĝo de gloro eniru. Same ĉiuj sanktuloj de Dio leviĝis kontraŭ Satano, volis ekkapti lin kaj disŝiri lin. Denove interne estis klamate: Princoj, levu viajn pordojn, leviĝu la eternaj pordoj, kaj eniros la reĝo de gloro. Denove demandis Infero kaj Satano je tiu klara sono: Kiu estas tiu reĝo de gloro? Denove estis dirate de tiu mirinda voĉo: La Sinjoro de la virtoj: tiu estas la reĝo de gloro¹.

8: 1 Jen subite ektermis Infero, la pordoj de la morto kaj ĝiaj rigliloj neniiĝis, la feraj traboj rompiĝis kaj falis teren, kaj ĉio malfermiĝis². Satano restis en la mezo, staris konfuzite kaj ĉagrene, kun piedkatenoj ĉe la kruroj. Kaj jen la Sinjoro Jesuo Kristo venis en klareco de ĉiela lumo, milda, granda, humila, portante katenon per siaj manoj: tiun ĉe la kolo li ligis al Satano, kaj ankaŭ ĉe la dorso li ligis liajn manojn: li ĵetis lin malsupren en Tartaron, metis sian sanktan piedon al li sur la gorgon, dirante: Tra ĉiuj jarcentoj multege da malbono vi faris, neniamaniere vi ripozis: hodiaŭ mi do transdonos vin al la senĉesa fajro. Li rapide alvokis Inferon, kaj ordonis al li: Forigu tiun ĉi plej fian, plej aĉan, kaj tenu lin sub via gardateco ĝis la tago, kiun mi ordonos. Li ekprenis lin kaj malaperis kun li sub la piedoj de la Sinjoro en la profundon de l' abismo.

¹ En tuta ĉi teksto estas pluraj citoj kaj duoncitoj el la Biblio; sed Psalmo 24:7-10 ĉi tie ripetiĝas

² Oni pensu pri Dante kaj ties *Infero* kie rompita ponto ankoraŭ atestas pri tiu ĉi descendo de Kristo: vidu en la traduko de Kalocsay, ĉe la 11-a Kanto kaj ĉe la 18-a Kanto belajn klarigajn bildojn. *Infero* 21:112-114.



Infero laŭ Doré, ilustraĵo por La Dia Komedio

9: 1 La Sinjoro Jesuo Kristo, Savanto de ĉiuj, plena kaj plej milda, tiam resalutis bonvoleme al Adam kaj diris: Pacon al vi, Adam, kune kun viaj filoj per senfinaĵ jarcentoj. Amen. Patro Adam tiam ekkruŝis³ ĉe la piedoj de la Sinjoro, kaj post restariĝo li kisadis liajn manojn, kaj diris forte plorante: Jen la manoj, kiuj min formis, atestante al ĉiuj; li diris al la Sinjoro: Vi alvenis, reĝo de gloro: por savi la homojn kaj por komenci vian regnon poreterne. Ankaŭ nia patrino Eva sammaniere ekkruŝis al la Sinjoro antaŭ la piedoj, kaj restariĝinte kisadis liajn manojn, kaj profunde plorante ŝi diris: Jen la manoj, kiuj formis min, atestante al ĉiuj.

2 Ĉiuj sanktuloj tiam komencis adore ekkrii: Benata kiu venas en la nomo de la Sinjoro: Dio la Sinjoro eklumis al ni. Amen poreterne. Haleluja por eterno de eterneco. Laŭdo, honoro, virto, gloro,

³ Laŭlitere: alruliĝis al.

ĉar el la alto vi venis viziti nin. Kantante Haleluja kaj jubilante pri gloro ili kunkuris sub la manoj de la Sinjoro. La Savanto tiam ĉion ekzamenis kaj formordis parton de Infero; kun sama rapido kiel li ĵetis parton en Tartaron, li kunportis parton kun si al la ĉielo.

10: 1 Ĉiuj sanktuloj de Dio tiam demandis la Sinjoron, ke kiel signon de sia venko li lasu sian krucon en Infero, por ke ĝiaj plej fiaj servantoj ne povu reteni kulpigiton, kiun pardonis la Sinjoro. Tiel okazis; la Sinjoro metis la krucon meze de Infero: estas signo de venko kaj restos ĝiseterne.

Tiam ni ĉiuj eliris de tie kune kun la Sinjoro, kaj ni lasis Satanon kaj Inferon en Tartaro. Al ni kaj multaj aliaj estis ordonite, ke kun nia korpo ni resurektu, por doni ĉi-monde ateston pri la resurekto de nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj pri ĉio, kio okazis en Infero.

Tio ĉi, plej karaj fratoj, estas, kion ni vidis kaj ni atestas pri tio, ĉar vi igis nin ĵuri pri tio. Li estas nia atestanto, li kiu por ni mortis kaj resurektis – kaj ĉio okazis komplete, kiel estis skribite.

11: 1 Kiam ĉio ĉi estis legita tutaĵe, ĉiuj, kiuj ĝin aŭdis, falis vizaĝaltere, amare plorante kaj kruele batante al si la bruston, kriante kaj dirante: Ve al ni! Kiel okazis ĉi tio al ni mizeraj? Fuĝis

Pilato, fuĝis Annas kaj Kajafas, fuĝis Pastroj kaj Levidoj, krom tio <fuĝis> ankaŭ la popolo de la Judoj, plorante kaj dirante: Ve al ni mizeraj! Sanktan sangon sur la teron ni elverŝis.

“Tio ĉi, plej karaj fratoj, estas, kion ni vidis kaj ni atestas pri tio, ĉar vi igis nin ĵuri pri tio.

Tri tagojn do kaj tri noktojn panon kaj akvon ili neniamaniere gustumis, kaj neniu el ili reiris al la sinagogo. La trian tagon tamen revenis la kunveno, kaj oni legis la alian paperon, tiun de Leŭcio: kaj oni trovis en ĝi nek pli nek malpli, eĉ laŭlitere, ol kion enhavis la skribaĵo de Karino. Tiam perturbiĝis la sinagogo, kaj ili ĉiuj lamentadis 40 tagojn kaj 40 noktojn, atendante de Dio pereon kaj venĝon. Sed la amplena plejalta pardonanto ne tuj neniigis ilin, ĉar li donis al ili larĝan eblecon por penti. Sed ili ne montriĝis indaj konvertiĝi al la Sinjoro.

Tio ĉi estas la atestaĵoj de Karino kaj Laŭcio, plej karaj fratoj, pri la filo Kristo de Dio, kaj pri liaj sanktaj faroj ĉe Infero: al li ni ĉiuj donu laŭdon kaj gloron tra la senfinaj jarcentoj da jarcentoj.

Amen.

La Regno de Dio laŭ Sankta Luko 17:

20 Kaj kiam la Fariseoj demandis al li, kiam venos la **regno de Dio**, li respondis al ili, dirante: La **regno de Dio** ne venas kun observado; 21 kaj oni ne diros: Jen ĉi tie, aŭ: Jen tie! ĉar jen la **regno de Dio** estas inter vi.

Ekumena Diservo ene de IEK en Svitavy

Teksto kaj fotoj Petro CHRDLÉ, ĈZ

La ĉeĥa distrikta urbeto Svitavy estas malgraŭ sia eteco (malpli ol 20 000 loĝantoj) al la esperantistaro sufiĉe konata pro la Esperanto-muzeo. Kaj tiu muzeo fariĝis konferencejo por la ĉi-jara Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK (IEK) kun la temo “Sciencfikcio kaj robotoj”. Ĝi okazis de la 14-a ĝis la 20-a de junio 2012 kaj ĝin ĉeestis 60 partoprenantoj el 13 landoj, krome pluaj 22 venis



plibonigi sian Esperanton en la paralela kurso gvidata de Stano Marček (SK). Ĉiutage antaŭtagmeze la konferencanoj ĝuis la laŭtemajn prelegojn de Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek, ES), Mikaelo Bronštejn (RU), Petro Chrdle (CZ), Mélanie Maradan (CH), István Nemere (HU) kaj Toon Witkam (NL), sed ankaŭ la prelegon pri la urbo kaj regiono fare de prezidantino de la loka Esperanto-


Klubo Libuše Dvořáková. Poste oni jam havis komunan programon, posttagmeze turisman, vespere kulturalan. Tamen, la lunda posttagmezo estis dediĉita al la seminario pri Esperanto-bibliotekoj kaj arĥivoj gvidata de Detlev Blanke (DE).

Enkadre de la konferenco okazis dimanĉe posttagmeze ekumena Diservo en la plej antikva preĝejo de Svitavy, katolika preĝejo de sankta Egidio el la jaro 1170. Komence de la Diservo la partoprenantojn bonvenigis la loka katolika dekano Václav Dolák, kiu sekve devis foriri pro aliaj taskoj. Sub la gvido de la remonstranta pastoro Gerrit Berveling (NL) kuncelebris la Diservon katolika pastro Zdeněk Gerhard Klimeš, kunagis ankaŭ evangelika laiko Pavel Polnický. La folion por la partoprenantoj preparis Albrecht Kronenberger (DE) laŭ la ekumena Diserva libro “Adoru”. Du el Bibliaj kantoj de Antonín



Dvořák kantis Miroslav Smyčka. La tutan Diservon akompanis juna orgenludantino Kristýna Řebíčková, kiu kutimas orgenludi dum Diservo kaj en sia vilaĝa preĝejo, kaj en Prago. Per legaĵo el Biblio kontribuis ankaŭ Eric Laubacher (FR). Do la Diservo estis vere ne nur ekumena sed ankaŭ internacia.

La Diservon partoprenis ankaŭ la urbestro de Svitavy David Šimek, kiu kune kun la prezidantino de OSIEK Anne Jausions (FR) post la Diservo malvaligis memorŝildon pri IEK apud nove plantita Esperanto-arbo (ĉeĥa nacia arbo tilio) kaj per tio inaŭguris la novan Zamenhof-Esperanto Objekton.



Skizo de la ekumena Diservo

Gerrit BERVELING, NL

Foriru al via propra lando kaj tie ĝenu la homojn. Ĉi tie estas Bet-El, sanktejo de la reĝo kaj domo de la regno.

Amos respondis. Mi ne estas profeto sed nur paŝtisto – JHVH alvokis min kaj diris: Iru kaj profetu al mia popolo Izrael. Amos 7:12-15

Jesuo komencis forsendi ilin po du – kaj li donis al ili aŭtoritaton super malpuraj spiritoj – nenion kunportu krom bastono, nek panon nek saketon nek monon. Kie vi estas akceptata, restu tie ĝis pluirado. Aŭ se ne akceptata, skuu la polvon de viaj piedoj por atesto.

Ili foriris prediki ke oni pentu. Ili elpelis demonojn, kaj sanigis.

Marko 6:7-13

Amos – la nomo signifas “ŝarĝo” – klare simbola por la tasko profeta. Amos vivis kaj aktivis ĉirkaŭ la mezo de la 8a jc a.Kr. / pli malpli epoko de Jesaja, Miĥa, Hoŝea / tempe de Homero. En tiu epoko estiĝis ŝajne la biblia fenomeno “profetado”. Amos sin mem titolas ne profeto sed ŝafbredisto / kultivisto de figarboj el Tekoa, sude de Jerusalemo – tempe de reĝo Uzzia de Jehuda, de reĝo Jerobeam la 2a de Izrael. Amos agadis en la norda regno Izraelo, eble unue en Samario la ĉefurbo, poste en Bet-El, kie

estis ĝia templo. La norda regno trapasis periodon de florado politika kaj ekonomia – epoko de malatento pri homoj je la rando de la socio. Amos – unu el la unuaj profetoj kun propra libro. Antaŭe estis Samuel kaj Elija – en libro Samuel kaj Reĝoj.

La libro Amos komenciĝas per profetaĵoj katastrof-minacaj kontraŭ Aram, Filiŝtoj, Tiro, Edom kaj Moab. Poste mallonge kontraŭ Jehuda. Kaj tiam – ĉapitroj 3-9 – temas pri Izrael, la norda regno. Laŭ la profeto Izrael kulpas pri socia maljusto: la riĉuloj subpremas / ekspluatas la malriĉulojn, ili ĝuegas sian riĉon, malĉastas kaj estas koruptaj. Eĉ la malmultajn profetojn, kiuj venas averti, ili forpelas. Dio sendis etajn punojn sed tio ne helpis. Nun do Dio sendos grandajn katastrofojn kaj fine, se necese, eĉ ekzilon.

En la 7a ĉapitro sekvas kelkaj minacoj konkretaj; – tiam venas la pastro Amaŝa laŭ ordono de la reĝo: Amos foriru returnen al sia propra lando – for vi, fremdulo, ni ne bezonas vin tie ĉi! tio ĉi estas Bet-El (Domo de Dio), sanktejo de la reĝo, templo de la regno. Ne por fremduloj do! Amos protestas: Mi ne estas profeto sed Dio sendis min el malantaŭ miaj ŝafoj ĉi tien averti vin.



Demando, kiu depost jardekoj ĉe mi ĉiam reaperas, sed ĝis nun eĉ nur parte kontentiga respondo, estas: kial en tiu epoko ĝuste en Hebrea lando aperis tiaj profetoj kiuj kontraŭas la establitan potencon? Profetoj estis ankaŭ en aliaj landoj – ekz en Egiptujo, profetoj de Amon. Granda potenco, kiu kune kun la reĝo Faraono gardis / garantiis la establitan ordon. Sed en la Hebrea lando ĝuste la profetoj ofte sin turnas rekte kontraŭ la establitaĵojn, la reĝon, la pastrojn. Kial?

Ja ĝuste tiulingve je la Dio JHVH estis konata kiel la voĉo en nia konscienco kiu diras: Kie estas via frato? Vi ja respondecas pri ties bonfarto!

La riĉuloj subpremas / ekspluatas la malriĉulojn, ili ĝuegas sian riĉon, malĉastas kaj estas koruptaj. – Jesaja poste diros: Oni aĉetas unu domon post la alia – tiel ke nenio restos por la malriĉuloj.

Evangelio laŭ Marko – la plej unua kiun ni posedas: tute skeme farita: Jesuo predikas en la nordo, poste – dua etapo – kun kelkaj li ekiras suden – tria etapo: en Jerusalem la fina batalo kontraŭ la pastra potenco ĉirkaŭ la templo – la pasiono de Jesuo – la morto. La virinoj ĉe la malferma tombo nur konstatas ke li malaperis. Ili nenion diras – ili timas.

En la hodiaŭa legaĵo, Jesuo kvazaŭ prove forsendas disĉiplojn en duopoj. Nenion kunprenu, nek vestaĵojn, nek mangaĵojn, nek monon – ĉio ĉi ne estas centra, do venos iel. Sed vi – prediku, diru al la homoj ke ili ekvivu nove – ke ili konvertiĝu, kaj sanigu ilin.

Sanigi el malpuraj spiritoj – el

la malbono. Ĉu tio estas tiel reala ankoraŭ nun? tio ja estas eksmoda vidmaniero, ĉu ne: Dio kontraŭ diablo? – nu, kion pensi pri drogoj, pri sklaviĝo al / mania pasio pri kio ajn... drogoj / serĉado de plezuroj, de mono, de hazardludado? ĉu ĉio ĉi ne iel rolas foje kvazaŭ nuntempaj dioj / idoloj? – Ĉu sekvantoj de Jesuo ne iel devus sanigi de tio?

Laŭ la nuna teksto, estas relative simple esti sekvanto de Jesuo: savu la homojn el tiaj idoloj aŭ ŝajndioj – sanigu ilin – tute ne temas ĉi tie pri komplikaj teologiaĵoj, nek gravaj diskutoj pri fido aŭ nefido je Dio, nek pri ekleziaj ordinoj aŭ institucioj: fariĝu novaj homoj, ekvivu nove! For la malbonajn kutimojn – eble la malsanaj kutimoj, eble el

antaŭjuĝoj, – malbonaj spiritoj eble ankaŭ estas, se kredi al Amos, profitigi la riĉulojn kontraste al la malriĉaj homoj, eble eĉ konfidi je siaj politikaj aŭ ekonomiaj amikoj estas ia tia malbona spirito kiu kontraŭas kompatemon kaj amon al la proksimuloj.

Ĉu ne povus esti, ke ni ĉiuj kelkfoje estas vokataj fariĝi tia profeto kontraŭ nia proksimulo, ke al li / ŝi foje ni agu kiel profeto: atentu kion vi faras, ĉu vi iras je la ĝusta direkto? Prenu la direkton al la vivo.

Ni ja konas la tekstojn el la Torao: Dio diras: mi metas antaŭ vi vivon kaj morton – elektu do la vivon, por ke vi vivu.

Amen



La preĝo laŭ la libreto Preĝo por ĉiu tago:

6.9. Mia Patro, mi deziras preĝi hodiaŭ por tiuj, kiujn mi facile forgesas. Mi preĝas por tiuj, kiujn mi ne amas. Gardu ilin kontraŭ miaj propraj sentoj; sanktigu miajn emojn. Donu al mi kompateman kaj puran koron.

Mendu la preĝlibreton ĉe

Pavel Polnický;
Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
+420 325 615 651; cea.polnický@quick.cz



Henk de Hoog – Andreo Cseh 6

Redaktis Ed BORSBOOM, NL

En la daŭro de 1946 De Hoog paŝo post paŝo faras distancon je Universala Ligo (UL) kaj Andreo Cseh kun lia gazeto La Praktiko. De Hoog deziras sian engaĝon en la nederlanda Esperanto-movado kaj malpli en la internacia. Ironie estas, ke De Hoog mem fariĝos poste prezidanto de la internacia KELI. La kontakto inter ambaŭ Esperanto-gvidantoj malkreskas kaj ilia korespondado ĉesas en 1948.

Amsterdam, 1945-11-21

Al s-ro A.Cseh

En Amsterdamo ni ankoraŭ ne povas komenci [la propagandon por UL] pro manko de komunikiloj por forgluti la grandegajn distancojn. La tramoj veturas nur dum tre malgranda parto de la tago.

Hieraŭvespere mi vizits la LEEN-sekcion. Ĉeestis naŭ anoj. Ankaŭ tie oni povas diri “morto estas en la kaldrono” (2 Reĝoj 4:40).

Kun zorgo mi vidas mian provizon de papero elĉerpiĝi, Ĉu vi povas helpi?

Kun koraj saluto, H. De Hoog

Hago, 1946-01-07

Al s-ro H. De Hoog

Dankon pro la traduko de la melkistina artikolo. Ĝi estas tre taŭga por nia gazeto [La Praktiko]. Sed mi devas demandi, ĉu vi ne povas skribi presotajn aferojn per maŝino? Ni devas doni al la presejo ĉion nepre en maŝinskribo, ĉar la kompostistoj ne komprenas la mondlingvon! Do ni devas ĉiun mane skribitan artikolon reskribi maŝine.

Jen mi povas vin helpi per leterpapero, sendante ĉi tie unu liniitan blokon. Ĉu ĝi taŭgas? Ĝi estu modesta rekompenco novjara pro via helpado.

Atendante viajn pluajn komunikojn kaj varbaĵojn [por UL], mi salutas vin

samideane kaj amike, A. Cseh

Amsterdamo, 1946-02-16

Al s-ro A.Cseh

Mi devas ankoraŭ danki vin pro la bloko da leterpapero. Mi esperas iom perlabori ĝin. Sed kvankam mi legas kelkajn periodaĵojn, mi devas konfesi, ke mi ne trovis taŭgan materialon por UL. La tuta pozicio de UL ne estas centprocente klara al mi, ĝiaj rilatoj al aliaj Esperanto-organizaĵoj, ĝia loko inter la multegaj pac-organizoj, ĝia rilato al la Internacia Esperanto-Instituto kaj La Praktiko.

La evoluo de la Esperanto-movado en nia lando unuflanke estas tre kontentiga, aliflanke mi bedaŭras, ke meritplenaj personoj kiel la Isbruckeroj kaj entute la tuta grupo, kiu ariĝas ĉirkaŭ la Instituto, praktike nun staras flanke de la movado nacia. Ĉu la kontrastoj vere estas tiom gravaj, ke oni ne povas kune labori? Iom pli da bonhumoro ĉe ambaŭflankoj ne estus superflua. Kaj oni forlasu la manieron de personaj kalumnioj, ekzemple de FLE kontraŭ vi.

La ortodoksa protestanta preĝejo en Nederlando, disputema super ĉia racio, eĉ ne bezonas honti kompare kun la Esperanto-movado.

Via peto maŝinskribi ĉion estas komprenebla, sed neplenumebbla. Mi ne havas iun maŝinon kaj ekzistas ĝenerala malabundo de skribmaŝinoj!

Kore salutas, H. De Hoog

Hago, 1946-02-25

Al s-ro H. De Hoog

Mi komprenas, ke vi ne tute travidas la UL-aferon. Ni devus detale paroli pri la aferoj, por funde diskuti ĉion. Per korespondado tio ne estas ebla. Do ni atendu taŭgan momenton, eble okaze de semajnfina vizito via al Hago.

Jes, estas bedaŭrinde, ke ni estas kvazaŭ ekster la movado, sed kie estas la kulpo? Mi opinias, ke nenia grava kaŭzo estas por la diseco kaj mi neniam rifuzis kunlaboron. Male!

Ĉu mi devas havi bonan humoron, kiam mi ricevas tiajn atakojn, kiaj aperis en la [FLE-gazeto] “Laborista Esperantisto”?

Do ni atendu okazon de interparolo.

Kun koraj bondeziroj kaj amikaj salutoj, A.Cseh

Hago, 1946-09-11
Al s-ro H. De Hoog

Mi denove gratulas al vi pro via bonega traduko en Utrecht kaj pro la transsendo de la teksto de la prelego de prof. Waringhien. Bedaŭrinde via peno estis vana, ĉar hieraŭ vizitis min s-ro Brakké kaj repostulis la tekston. Hodiaŭ s-ro Leideritz telefonis al mi kaj klarigis, ke s-ro Waringhien faris eraron donante la tekston por publikigo en La Praktiko, ĉar la rajto apartenas al la Centra Komitato, kiu mem volas eldoni ĝin.

Kun koraj salutoj, amike, A.Cseh


Amsterdam, 1946-11-17
Al s-ro A.Cseh

Iu el miaj konatoj envokis mian helpon por studento de la klasikaj lingvoj, kiu en Nederlanda Hindujo (Indonezio) perdis ĉiujn siajn havaĵojn kaj librojn. Ĉu vi povas mendi por li la librojn de la aldonita listo en Anglujo? Se jes, skribu kelkajn liniojn al mi, por ke mi povus ĝojigi lin. Se ne bonvolu resendi la liston.

Via H. de Hoog

Andreo Cseh aranĝis kun peno la sendon el Anglio. La libroj alvenis 1947-04-26. De Hoog dankis 1947-05-31.

Ĉi tiu ero el la serio pri la korespondo inter De Hoog kaj Andreo Cseh estas la lasta en Dia Regno.



Evidente plu aktivas

Raportas Rob MOERBEEK, NL

La fondaĵo de la karmemora Jacques Tuinder “Zienderogen” (Evidente) regule raportas pri siaj agadoj: laste pri misioj en Albanio kaj Ukrainio. La blindullernejo en Tirana evidentiĝis bone prizorgata kaj la estro povis en demandaro de la kunlaboranta organizaĵo “Sovaĝaj Anseroj” indiki la ankoraŭ sentatajn mankojn. Aliflanke la prezidanto de la albana blindulligo montris grandiozan konstruon de luksa zorgejo por diversaj handikapuloj, kiu bedaŭre pro monmanko de 4 jaroj stagnas, malgraŭ investo de miliono da eŭroj.

En Lviv, Ukrainio ĉi-aprile tri fakuloj helpis ankoraŭ nespertajn finstudintojn pri okulmezurado kaj povis konstati grandan progreson, tiel ke la universitataj kolegoj nun disponas pri entuziasma teamo. La ĵus fondita ukraina branĉo de “Zienderogen” ricevis la necesajn aparatojn kaj recipe spertojn, kiuj utilis ankaŭ al 464 nepagipovaj malforte vidantoj.

“Evidente” grandanime helpis ankaŭ al la sola UEA-membro en Malavio, kies fakturo el privata kliniko (post nesukcesa okul-operacio en loka hospitalo) alie ne estus pagebla. Krome ĝi pagis grandan sumon por ebligi la studon de alia afrikano laŭ peto kiun peris belgaj esperantistoj.

Nun, komence de julio venis plia raporto pri sukcesa misio al Rumanio (Mircea Voda, kaj 5 aliaj lokoj), kie du geedzaj paroj sukcesis en naŭ tre intensaj labortagoj plenumi pli ol 1300 mezuradojn, el kiuj rezultis preskribo por

930 paroj da okulvitroj. Kaj tuj post la junia misio el tiuj oni jam sendis 250 parojn.

Laŭ la principo starigita de Jacques Tuinder ili traktis nur la plej malriĉajn: rumanojn, turkojn kaj ciganojn. Jam en la komenco iu ŝtelis la valizon de unu el la viroj. La gastiganta pastro kaj la nederlanda kolego donis kelkajn vestojn, tiel ke la edzino, kiu raportas, nokte vekiginte, ekvidis: jen viron en ruĝa boksista kuloto apud si, kaj ektimis, ĝis revenis la memoro pri la hieraŭa malbonŝanco. La gastigantino krom zorgi pri bonegaj manĝoj ankaŭ donacis anstataŭan valizon. Plia aventuro estis matena manko de duŝakvo, tiel ke necesis uzi botelan akvon. Kaj oni laboradis en temperaturo de 38 gradoj, ofte en tro malgrandaj ejoj. Plej dolorigis, ke jam komence necesis seniluziigi ankoraŭ centon da atendantoj post la laborfino. En turka preĝejo venis nur malmultaj bezonantoj: 65 aperis, al kiuj eblis preskribi 40 okulvitroparojn. Tamen la bona etoso, la helpemo de la invitintoj (inkl. interpretistojn) donis senton de kontento pri la farita laboro, pro kiu ankaŭ la lokanoj ja esprimis sinceran dankon.

Daŭre validas la UEA-konto vidi-x por donacoj al “Zienderogen”.

Se vi transkontigos vian kontribuon al la Nederlanda konto ĉe la ING-banko ne forgesu ke ĝi nomiĝas nur

“Stichting Zienderogen”.

IBAN- NL20INGB0001020100

BIC- INGBNL2A

☞

Ni gratulas

Premio de fondaĵo Antoni Grabowski

Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG), starigita antaŭ pli ol dudek jaroj dank' al donaco de s-ro Adam Goralski, celas subteni la Esperantan kulturon. Ĝi aljuĝas premiojn kaj subvenciojn meze ĉiun duan aŭ trian jaron. En la Hanoja UK estis anoncitaj la ĉi-jaraj premioj.

Premion de 650 usonaj dolaroj ricevis la elstara figuro de la Esperanta kulturo, specife beletro, la nederlanda intelektulo **Gerrit Berveling**. Jen la pravigo de la komisiono de FAG, kiu konsistas el Ulrich Lins, István Ertl kaj Shi Chengtai:

– Impone sonas eĉ simpla listigo de la postenoj de Gerrit Berveling en Esperantujo: prezidanto de la landa Esperanto-asocio en Nederlando, membro de la Akademio, redaktoro de la literatura revuo "Fonto" kaj de la rubriko 'Spirita vivo' en "Monato". Sed vere timige estas konsideri la amplekson de lia verkaro originala kaj beletra: ĉe la Libroservo de UEA haveblas 17 titoloj liaj kiel aŭtoro kaj 51 kiel tradukisto. Ĉe la aŭtoro Berveling vicas abunda manpleno da poemaroj; studoj beletraj, bibliaj, religiaj; la romano "Fadenoj de l'amo"; skizoj el lia vivo de pastoro, pluraj kajeroj da rememoroj, vojaĝimpresoj...

– Kiel tradukisto, li plugis ĉiujn kampojn klasikajn, hebrean, helenan, kaj precipe la latinan, ekde Cicerono, Horacio, Katulo kaj Marcialo ĝis Johano Hus kaj Erasmo de Roterdamo. Eble plej imponas lia grandioza projekto, ekzistanta en neniu alia lingvo, multvoluma "Antologio Latina", kiu prezentas verkojn latinlingvajn ekde la komenco ĝis la nuntempo. La premio de Fondaĵo Antoni Grabowski rekompencas kleron kaj diligenton, arton kaj fekundon en la persono de Gerrit Berveling.

❧

Aŭdebla Biblio

Mi ĝojas informi vin, ke hodiaŭ la projekto "Aŭdebla Biblio" atingis novan nivelon: 70% el la Biblio estas legita. Ankaŭ kuraĝigas nin, ke lastatempe alia legonto sin proponis, kaj

intencas baldaŭ legi kun ni. Ni ĝoje bonvenigos ĉiujn, kiuj volas helpi!


Parenteze, nia provizora hejmpaĝo estas: <http://hw.cs.southern.edu/eb/>

Fratecajn salutojn de Keneto

Venu ĉiuj



1. Ve - nu ĉi - uj, ki - uj por - tas
Ve - nu, ki - uj ne plu for - tas



vi - vo - ŝar - ĝon' sen la pac'.
viv - ba - ta - li sen la grac'.

refreno:



1.-4. Kre-du nur al Di', kre-du nur al Di'.



Ki-u al Je - su-o ve-nos, pa-con tro-vos li.

2. Venu ĉiuj, kiuj ploras
en malriĉo kaj mizer'.
Venu, kiuj voj-esploras
en mallum' kaj mort-sufer'. KREDU nur ...
3. Li kun brakoj malfermitaj
vokas daŭre kun persist'.
Al konsolo vin invitas
koro de Jesuo Krist'. KREDU nur ...
4. Mond-trezoro eta estas
en kompar' kun Lia pac'.
La anim' beate festas,
kies fonto estas grac'. KREDU nur ...

VĀGA BLOTT ATT TRO • M: W. S. Weeden, presita Len 1896 • sveda T:
Johan August Gustafsson • E: Karin Persson kaj Karl Olof Sandgren,
1962 en EKA 29 • AK 193